


BOHEMA REVUO ESPERANTISTA

kun literatura aldono

LEGOLIBRO DE BOHEMAJ ESPERANTISTOJ

Oficiala organo de bohemaj Esperantistoj kaj de
CENTRA ASOCIO
BOHEMA UNIO ESPERANTISTA (B. U. E.)

Ni laboros por Esperanto.

CENTRA ASOCIO BOHEMA UNIO ESPERANTISTA.
— SÍDLO: PRAHA I. 342. KAVÁRNA „UNION". —
KANCELÁŘ A UČEBNA: II. VODIČKOVA ULICE 38.
REDAKCE REVUE: II. DITTRICHOVA ULICE 7.

Členové klubů sdružených v „Ústředním Svazu Bohema Unio Esperantista" a těch, které za jeho součinnosti se ustavují, dostávají tuto revui za roční předplatné K 2·50 prostřednictvím pp. jednatelů.

Roč. I.—V. pro členy B. U. E. po K 2·20.

Svaz jednotlivců „Ligo de Bohemaj Esperantistoj", Klub Esp. v Praze (dříve „U Donátů") a Klub Esp. v Radvanicích dávají členům tuto revui zdarma.



1912. **BŘEZEN — MARTO** **VI. 3.**



Roční předplatné: 3 K. Ročník I.-V. po K 2·50. **Cena tohoto čísla s přílohou: 30 hal.**

ČASOPIS ČESKÝCH ESPERANTISTŮ
BOHEMA REVUO ESPERANTISTA

vychází 10krát ročně (kromě srpna a září). | eliras monate (krom aŭgusto kaj septembro).

Redaktor: **Ed. Kühnl.**

Předplatné (ročně **3 K** pro Rakousko, Fr. 3·75 pro cizinu), a vše týkající se časopisu, budiž zasláno pouze na adresu: „Časopis Českých Esperantistů", Praha II.-2023, Dittrichova ul. 7. Redakce vyhražuje si právo upraviti články pro tisk. Netištěné rukopisy se vrátí, byla-li přiložena známka; pracem původním dána přednost. Abonpago, akceptata por almenaŭ unu jaro (**Fr. 3·75** = 1·50 Sm por fremdlando, 3 K por Aŭstrio), kaj ĉio, kio koncernas la gazeton, estu sendata laŭ adreso:

„Časopis Českých Esperantistů" en Praha II. (Bohemujo - Aŭstrio).
II.—2023. Dittrichova ul. 7.

* Účet poštovní spořitelny 93.281. *

Příruční
slovník česko-esperantský
jest v tisku!

Před rokem oznamovali jsme dokončení prací na rukopisu podrobného slovníku česko-esperantského, na němž pracováno po několik let. Abychom nebyli v pochybnostech, zda toto dílo nalezne půdu dosti připravenou a zda počet odběratelů může zajistiti hražení alespoň polovičního nákladu, rozeslali jsme všem spolkům a čtenářům přihlašovací lístky. Nepoměrně malý počet přihlášek přesvědčil nás však, že nelze dnes dosud pomýšleti na vydání díla tak obsáhlého, které jest omezeno pouze na českou veřejnost.

Protože však nezbytnost slovníku česko-esperantského jeví se stále více a nedostatek této pomůcky jest citelným i v propagandě Esperanta u nás, rozhodli jsme se přistoupiti k vydání menšího, přes to však značně obsáhlého slovníku: ač jest pouze výtahem z podrobného, přece obsahuje tento

příruční slovník česko-esperantský 15000 slov

a jsme jisti, že jeho bohatý obsah a neveliká cena (asi 3 K váz.) zaručí mu příznivé přijetí u všech přátel Esperanta.

Všem, kdo zaslali přihlášku na podrobný slovník, bude sdělena oběžníkem definitivní cena tohoto příručního slovníku jakmile bude dotištěn a budou jim zaslány složní listy, aby jej mohli objednati.

Redakce **„ČASOPISU ČESKÝCH ESPERANTISTŮ“.**

INTERNACIIGO DE NACIO-POLITIKAJ DEMANDOJ.

Krom Eŭropo oficiala, krom Eŭropo registara, kabineta, ministeria kaj diplomata ekzistas Eŭropo neoficiala, Eŭropo de la nacioj, kiuj, ne havante sian memstaran organizacion ŝtatan, malhavas ankaŭ sian internacian reprezenton; tiu ĉi neoficiala Eŭropo vivas sian propran vivon animan, luktas por sia spirita kaj materiala havaĵo. Ĝi estas plejparte nacioj, kiuj aŭ per konstelacio de la historiaj cirkonstancoj estis senigitaj je sia memstara vivo de la pli forta rivalo, aŭ eĉ ne sukcesis evoluiĝi al memstara ekzistado. Oficiala Eŭropo konsideras la aspirojn de ĉi tiuj subpremitaj nacioj kiel ion, kion oni devas eviti, juĝante ilin interna afero de la koncernataj ŝtatoj.

Lastatempe montriĝis kelke da aperaĵoj, kiuj atestas tion, ke la aŭtonomiistaj kaj liberigaj klopodoj de la nememstaraj nacioj estas taksataj kiel nepra rezultato kaŭzita per potenciĝo de la nacionala ideo kaj per la historia evoluiĝo. Estas interesa, ke

ĉi tiuj novaj iniciatoj, kiuj metas la celadon de subpremitaj nacioj en novan lumon kaj starigas ĝin sur vastan bazon de evolucia neceso, ne devenas de la senpere interesataj nacioj mem, sed eliras el fortaj centroj de grandaj liberaj nacioj. Metropolo de la franca respubliko estas konstanta ponto de nova vivo, ĝi estas tero, kie burĝonas tio, kio morgaŭ maturiĝos. Ne estas hazardo, ke profesoro de historio ĉe la pariza universitato s-o Ch. Seignobos prelegas en lernejo de sociaj doktrinoj pri la aŭtonomiistaj klopodoj en Eŭropo. Lecionoj de s-o Seignobos estas interesa provo difini la historiajn kondiĉojn, el kiuj elkreskas nacie politika penado de la subpremitaj nacioj, interesa provo difini eblojn kaj rimedojn de la liberigaj bataloj. Kelkaj opinioj estas tre sentimaj kaj akrovidaj. Aŭtoro de „La historio de la samtempa Eŭropo" havas kuraĝon diri, ke la evoluiĝo de formoj absolutismaj al formoj deputitaro-konstituciaj malfavorigis la situacion de la subpremataj nacioj, ĉar potenco de la registaroj pligrandiĝis per la vasta bazo parlamenta, en kiu decidas majorito de la reganta nacio. Fondinte la „L' Office central des nacionalités", oni provis krei ian ekzekutivan komunan organon por la aŭtonomiistaj celoj de la malgrandaj nacioj. Grava subteno por tiuj ĉi liberigaj klopodoj estas la atendata leĝo pri la irlanda aŭtonomio. Irlandanoj estas rekte tipa ekzemplo de subpremita nacio. Iliaj suferoj, ilia heroa rezistado havis siatempe rimarkindan influon sur la pensado kaj sentado de la tuta mondo. Se hodiaŭ irlandanaj deziroj post tiom da internaj renversoj estas efektivigotaj, ĉu tio ne donas grandan esperon al ĉiuj ceteraj nememstaraj nacioj, ke f i n f i n e n e e k z i s t a s p o t e n c o, k i u p o v u s p e r e i g i n a c i o n?

Jes, la atingo de la irlanda aŭtonomio estas potenca fonto por reviviĝo de politika idealismo en Eŭropo. La suprenomita centra oficejo en Parizo aranĝas en junio de la nuna jaro universalan kongreson de nacieco kun programo tre riĉa kaj interesa. La anonciĝintaj oratoroj havas bonan nomon. La provo estas kore salutinda, skepso kaj moderecο ne devas esti malhelpo tie, kie estas donitaj kondiĉoj por fondo de influa organizacio. La memstaraj nacioj vivas ĉiu sian propran vivon, ili batalas izolite, unu sen helpo de la alia, ĉiu je sia konto. Estas bezone trarompi ĉi tiujn barojn de izoliteco, estas bezone koncentrigi ĉiujn individuajn klopodojn. Estas en povo de la subpremataj nacioj, internaciigi siajn problemojn, estas en ilia povo elkreskigi la konscion de la neoficiala Eŭropo, kiel dezirindan forton al forigado de la naciaj kaj politikaj maljustajoj. Jes, estas dezirinda la penado, krei internacian reciprokecon kaj solidarecon de la nememstaraj nacioj, kiuj en la ideo de nedependeco serĉas novan vivon.

(El „Samostatnost" 14. III. 1912; Dr. R. Brož.)

La suprenomita Centra Oficejo en Parizo (3. rue Taitbout) havas en sia honora prezidantaro eminentulojn de ĉiuj nacioj. Bohemojn reprezentas Lia Ekscelenco deputito dr. Jos. Fořt kaj prezidanto de la Bohema Nacia Konsilantaro deputito dr. J. Podlipný. Por garantii la plej multenombran partoprenon de Bohemoj ĉe la kongreso, estis starigita speciala bohema sekcio kun propra komitato en Praha, kiu prenis samtempe sur sin la taskon diskonigi la scion pri la Centra Asocio kaj pri ĝia organo „Les Annales des nacionalités", en kiu estas rezervita honora loko por la sciigoj el Bohemujo. La ĉefa informanto bohema estas prof. J. Hantich en Praha.

MONUMENTO DE LA HOMA LABORO.

Kiu ne estus aŭdinta pri la nomo de Eifel? En ĉiu okazo, kiam oni parolas pri iu speciale alta konstruaĵo, la turo de Eifel estas kvazaŭ mezurilo, kiu tamen ĉiam restas la plej kuraĝa verko de homa mano, neatingita ĝis nun koncerne sian altecon. Ĝia konstruinto surprizis la mondon ne sole per io ĝis tiam nekonita, sed ankaŭ per laboro tiel rapida, ke la turo estis preta la unua el ĉiuj konstruaĵoj, kiuj por la ekspozicio pariza en la jaro 1889 estis konstruataj. Malgraŭ tio, ke multaj voĉoj, kritikintaj malfavore la projekton antaŭ ĝia efektivigo, vidis en tiel alta konstruaĵo malbeligon de Parizo, forgesante, ke eĉ koloseco povas efiki impresige kaj bele, tamen fariĝis la turo fokuso de la ekspozicio kaj milmiloj jam venis, por vidi kaj admiri la novan mirindaĵon de la mondo, por mediti sur ĝia pinto . . . Neniu detalaĵo estas en la tuta verko okulfrapanta, ĉiuj linioj, ĉiuj arkoj plaĉas pro sia proporcieco. Sur betonitaj, 12 m profundaj fundamentoj ripozas kvar fertrabaj kolonoj, kiuj en alteco de 60 m. portas plataĵon en formo de galerio; tie sin trovas restoracioj, teatro kaj ronde promenejo ĉe la 300 m. lateroj de la kvarangula plataĵo. Super la kvar ĉefaj kolonoj, kiuj — same kiel la egiptaj piramidoj — montras la kvar geografiajn direktojn, kuniĝas la fera maso en gracian unukolonan turon, kiun kronas en alteco de tricent metroj vitrokovrita promenejo. La tutan mason da sep milionoj da kilogramoj, kiu konsistas el ferpecoj pezaj eĉ 3000 kg., kuntenas sume du kaj duono de milionoj da vinktoj. Dum du jaroj laboris 40 desegnantoj super la bezonaj 15 mil planoj. Sur la turo, kiun oni povas piede aŭ per liftoj supreniri, trovas lokon je unu fojo 23.000 personoj (la plej granda vizito dum la ekspozicio). Ĉiuhore povas suprenporti la liftoj preskaŭ 2400 personojn. Ne seninteresa estas la prezo de enirbiletoj: ĝis la unua etaĝo 2 Fr., ĝis la supro

5 Fr. La vizito de tiu ĉi koloso estas tre rekomendinda al ĉiu, kiu volas havi ideon pri la grandiozeco de Parizo, ĉar la galeriaj promenejoj en la unua kaj precipe tiu de la tria etaĝo estas ĉe klara vetero la plej ofte elserĉataj elrigardejoj, ebligante supervidi la urbon ĝis la ekstrema, en nubo perdiĝanta periferio. Kiel bela reliefa plano etendiĝas sub la rigardanto la panoramo de la metropolo, kiun trairas kiel arĝenta rubando la rivero Seine. Oni suprenveturu al la dua kaj tria etaĝoj: la feraj traboj estas videble pli kaj pli malpezaj, sub niaj piedoj estas la zinkaj tegmentoj de la restoracioj kaj galerioj unuaetaĝaj. Veninte en la duan, oni ne plu pensas pri la impresoj ĝuitaj en la unua etaĝo. Ekokupas nin refoje la nenie ankoraŭ vidita panoramo de la urbego. La dolĉe moviĝanta veturo de la vagono certigas nin pri fortikeco de la konstruaĵo kaj forprenas de ni ĉiun timon. La plej alta etaĝo, kiu estas duobligita per surmuntita nekovrita galerio, estas tiu loko, kie oni mirante kaj meditante pasigus pli ol unu horon, ĉirkaŭpaŝante de unu fenestro al la alia. Kelke da lastaj ŝtupoj alkondukas nin al la plej alta pinto de la mondo — elkonstruita per homa mano — al la ekslogejo de Eifel, kie nun estas fiksitaj meteorologiaj aparatoj. Plej alte flirtas la trikolora flago, metanta simbole sur la plej altan lokon la mirindan arton de la francaj inĝenieroj. La turo estas ankaŭ unu el la plej gravaj konstruaĵoj por Francujo pro siaj praktikaj aranĝoj: havante perfekte establitan stacion por senfadena telegrafio, ĝi estas laŭ la strategia vidpunkto la ĉefa stacio por transsendado de militaj ordonoj kaj signaloj al marŝipoj, ĉar la spaco, kien la elektraj ondoj estas komunikeblaj, ampleksas kvar ĝis kvin mil kilometrojn. Surportante krom diversaj aparatoj por observoj meteorologiaj potencajn reflektorojn, la turo estas samtempe taŭga stacio por orientiĝo.

Aug. Očenášek:

VIRINO KAJ GIMNASTIKO.

En la klopodoj pri la korpa eduko staras la bohema virino en la unua vico inter la virinoj de eŭropaj nacioj. Sed la kaŭzo ne bazas sur tio, ke la virino estus degenerinta, kiel oni povus konjekti laŭ la alta kultura nivelo de la bohema nacio. La tiel nomata kulturo havas ja siajn malfavorajn efikojn je la korpa kapablo de la popolo kaj de la virino precipe. Unuflanke ĝi ĵetas la virinon malriĉan en fabrikojn, ruinigas ŝin kaj senfortigas per nealkonforma laboro, aliaflanke ĝi eldorlotas virinon de la pli riĉaj sferoj al mallaboremo kaj ĝuamo — en ambaŭ okazoj ĝi fremdigas ilin al vivo familia kaj detruas en ili la patrinecon. El tio rezultas klopodoj pri la restarigo de la korpa kapablo de la

virino. Sed la bohema virino ne estas ĝis nun ankoraŭ degenerinta. La bohema nacio estas laŭokupe de pli granda parto terkultura; la sferoj inteligenta kaj industria de la popolo, kiagrade ilin kreis en ĝi la nova tempo, havas ankoraŭ radikojn en la kampistaro. Kaj la bohema virino portas en si postsignojn de tiu ĉi deveno rilate al siaj ecoj korpaj kaj moralaj. — Ŝi estas de forta staturo ĝis nun, ŝi laŭ sia tuta tipo estas bela kaj la patrineco estas ĉe ŝi en plena florado. Kelkaj regionoj eminentiĝas per plenfortaj virinoj de preskaŭ pratempa sano, aliaj per la vigleco kaj freŝa beleco. La bohema virino estas laborema, ŝparema kaj helpas prikonsiderinde la ĝeneralan bonstaton de la popolo. Ŝi ne estas patriotino tiom brile paradanta kiom Polino, sed ŝi plene vivas kun la familio, ŝi laboras kaj sentas por ĝi kaj tiom pli reale estas kunligata kun la sorto de la popolo, ol virino-patriotino de la societo altranga. Kaj tiu ĉi cirkonstanco mem, tiu ĉi kunvivado kun la familio ŝin alkondukis sur la vojon al la korpa pliperfektiĝo; ĉar ŝi iras tien, kien ĝi mem, ŝi ne disiĝas de ĝi kaj tiamaniere okazis, ke la virino el la popolo aperis en la sfero de la klopodoj pri la korpa perfektiĝo per ekzercado de la korpo, kio ĝis nun estis privilegio sole de la pli kaj plej altaj societaj klasoj. Estas konate, ke la bohema nacio trovis en sia Sokolaro modelan organizajon, kiu formas la spinon de ĝia nacia vivo. Tiu ĉi organizajo klopodas pri la plifortigo de la tuta popolo en ĉiuj rilatoj de la homa agado sur la bazo de sano, de progreso, demokratio kaj kuraĝo. La Sokolaro, penante enpenetri en la plej vastajn popolsferojn, ampleksis en sia laborkampo ankaŭ la virinojn. La boheman virinon ĝi igis Sokolino. Sekve ne sole la korpaj ekzercoj alkondukis ŝin al Sokolaro, sed precipe ankaŭ la vivbatalo de la nacio. Viro serĉis apogon en la virino kaj enkondukis ŝin en institucion, kiu por tia batalo, sukcesodona, la popolon preparas — en la Sokolaron. Li hardigas ŝin same kiel sin mem, koncerne la korpan kapablon, ke ŝi estu patrino de vivotaŭga generacio, li ŝin edukas ankaŭ morale kaj spirite. Ve al la popolo, kies virinoj ne kapablas kompreni la aspirojn de la viroj! (Tyrš.) Virino rapide ekkompreninte la ideojn de Sokolaro, ekflamis por ili, kaj de tio sekvas la rapida evoluo de virinaj grupoj sokolaj. La unuaj provoj enkonduki la gimnastikon de virinoj en Bohemujo estis iniciatitaj de Tyrš, kiu, kiel adepto de antiko, aprobis egalan gravecon de la korpa edukado de virino same kiel de viro. En la jaro 1869 li fondis la gimnastikan societon de virinoj en Praha, kiu dum longaj jaroj restis izola. Nur la jaroj naŭdekaj kreis ĉe la unuiĝoj sokolaj virinajn filiojn, kiuj havis nenion alian komuna kun la unuiĝoj krom tio, ke la virinoj praktikis la gimnastikon.

(*Daŭrigo.*)

JAZYKOVÝ RÁDCE — LINGVA FAKO.

KELKAJ LITERATURAJ RIMARKOJ PRI ESPERANTO.

Per la sekvanta artikolo ni celas montri, kiamaniere ni riĉigadu nian lingvon literaturan konforme al la spirito de la lingvo, restante fidelaj al la principoj de Fundamento.

La aŭtoro de Esperanto donis al ni per la ebleco kunmetadi vortojn el pli multe da fundamentaj radikoj tre bonan rimedon por trovi esprimojn por ideoj, kiuj ne havas propran, specialan radikformon. Per sia verkaro li mem donis al ni ŝatindan kaj ĉiam sekvindan ekzemplon, kiel ni profituzu tiun ĉi genian helpilon.

Por verkisto, scianta bone la lingvon kaj komprenanta ĝian spiriton, estas ja tre vasta kampo, ke li povu esprimi iun ajn ideon, ne bezonante pli multe da radikterminoj, ol estas troveblaj en Fundamento kaj en la verkaro de Zamenhof, ĉar eĉ hodiaŭ ni nepre devas konsideri lin la plej kompetenta kaj plej bone komprenanta la principojn de la lingvo. Estas nepre necese konsideri Esperanton ne ludilo en la manoj de ĉiu ajn, kiu eklernis, sed tre ofte bedaŭrinde ne finlernis ĝin kaj kiu, trovante, ke li ne scias esprimi iun ideon, konsideras Esperanton malriĉa kaj sekve sin tiom kompetenta, ke li havas la rajton enkonduki en la lingvon simple transskribitajn terminojn, ofte senpripense kopiatajn el la propra nacia lingvo. Ne estas mirinde, ke poste tia termino estas tute nekomprenebla por alinacianoj kaj fariĝas sole malhelpo kaj senutila konfuzigo de nia lingvo.

Ni lasu la rajton enkonduki tute novajn radikojn al la plej kompetentaj Esperantistoj: al la aŭtoro mem kaj al aliaj eminentaj verkistoj. Se ĉi tiuj trovas necesa enkonduki novan radikformon, tiam ni devas la aferon konsideri tute alie; ĉar ni povas esti konvinkitaj, ke tiuj ĉi komprenas la principojn kaj la spiriton de la lingvo kaj scias ĝin tiom fundodetale, ke, se ili trovas la novan formon bezona, ĝi efektive estas bezona kaj sekve uzinda kaj imitinda. La ceteraj Esperantistoj ne konsideru sin esti pli kompetentaj ol estas Zamenhof mem kaj penu per la rimedoj disponigitaj de Fundamento esprimi siajn ideojn tiamaniere, ke ili estu de ĉiu kompreneblaj. Oni certe trovos, ke en la plej oftaj okazoj kaj sole kun tre maloftaj esceptoj, la ideo estas esprimebla per kunmeto de du vortelementoj kaj la sperto pruvas, ke aŭtoroj, sekvintaj tiujn ĉi principojn, trovis aprobon de la tuta mondo esperantista pro la klareco kaj komprenebleco de sia stilo.

Por fariĝi perfekta Esperantisto, ne kontentiĝu per (supraja aŭ eĉ detala) trastudo de la gramatiko, sed legante verkojn de pli spertaj aŭtoroj notu la imitindajn vortojn, frazojn kaj paroltumojn. Kiel specimeno servu la sekvantaj elĉerpajoj el la verketo

„Sherlock Holmes en servo de la hispana trono“, pri kiu skribas membro de L. K. s-o J. W. Eggleton (la lerta tradukinto de „Karavano“): „Kiel lingvistikamanto mi notis dum la legado multe da imitindaj parolturnoj kaj esprimoplenaj kunmetitaj vortoj kaj mi povas vere konstati, ke mi ne sole amuziĝis per la verko, sed ankaŭ lernis.“ Alia membro de la L. K. s-o H. F. Höveler (Ĉefeĉ) skribas pri la sama libreto: „Tralegante Vian libron mi ne povas ne admiri Vian lertecon en la formado de verboj el du abstraktoj: frostoskui, rastkolekti, rigardsekvi, trompsuperi, rigardforuzi, memorfiksi, gutflui, batfroti ktp. ktp. kaj la grandan amason da vortigitaj ideoj el konkretoj kaj abstraktoj: mezafere, dumvive, nubmiene, findirote ktp. La samideanoj faros pli grandan servon al nia lingvo, kolektante tiujn ĉi vortojn, kiuj elmontras la kapablecon de nia radikaro, ol proponante „novajn radikojn“ kaj fabrikante vortaregojn el la nove elpensita materialo taŭga eble por novlatinuloj, sed neniam akceptota ĝenerale de la internacia Esperantistaro. La listo de la vortoj, kiun mi elĉerpis el Via traduko, montras, kion oni povas fari per la propraj elementoj de Esperanto . . .“

Kvankam la sekvanla nomaro enhavas esprimojn de ideoj simplaj, tamen ĉiu senpene komprenas ilin per helpo de radikvortaro:

unusola linio jediná řádka — ***en linioj subsekve*** v řádkách pod sebou — ***frostoskui*** zamraziti — ***veturprovadi aŭtomobilon*** zkoušeti a. — ***neĝblovita postsigno*** zavátá stopa — ***rastkolekti la paperojn*** shrábnouti papíry — ***plenlarĝe malfermi, plenangule malfermi*** dokořán otevříti — ***lavangruliĝi*** řítiti se jako lavina — ***palvizaĝa*** bledý (v tváři) — ***rigardsekvi la movon*** sledovati pohyb — ***kriadmoni iun*** okřiknouti někoho — ***ĝemsopiro*** sten — ***ĉaslaca besto*** uštvané zvíře — ***kuratingi*** dohoniti — ***trompsuperi*** přelstíti — ***bonmora societo*** slušná společnost — ***pagodevo*** platební závazek — ***partopago*** splátka — ***pretervole*** mimovolně — ***oftafoje*** častokráte — ***nobeldevena*** vznešeného, šlechtického původu — ***moŝtfavora dankesprimo*** blahosklonný projev díků — ***devkutimaj eldiroj*** obvyklé výroky — ***enlanda firmo*** domácí firma — ***ĉarmodolĉa ekrideto*** roztomilý úsměv — ***li fraptuŝis la apudstarantan pendhokaron*** poklepal na vedle stojící věšák — ***manpentrita*** ručně malovaný — ***memorfiksi*** vštípiti v paměť (zapamatovati) — ***rigardforuzi okulojn*** vykoukati si oči — ***pendornamita de ordenoj*** ověšen řády — ***gestmontri*** pokynouti — ***publika sinvidigado*** veřejné vystupování — ***tiucele*** k tomu cíli — ***gazetfragmento*** úryvek z časopisu — ***suna brullumo*** zážeh sluneční — ***laŭdece respekti*** patřičně si vážiti — ***kolorabunda, abundkolora*** pestrobarevný, sytých barev — ***ŝanĝvestita*** převlečený — ***vipkraki*** prásknouti bičem — ***korfavore mansigni*** kynouti vlídně rukou — ***viveca humoro*** živá nálada — ***scenriĉa procedo*** pestrý průběh — ***nazospiregi*** funěti — ***kurenfali en la ĉambron*** vřítiti se do

pokoje — *lertmova kaj movelasta* obratný a mrštný — *saŭmspiranta besto* supící zvíře — *pikpreni* nabodnouti — *streĉmalfermi la okulojn* vyvaliti oči — *atentostreĉa momento* napínavý okamžik — *mirbela transmetiĝo super . . .* divukrásný přemet přes . . . — *streĉleviĝi* vzepjati se — *eĥvastiĝi* rozléhati se — *pikfaligi la beston* skoliti zvíře — *la besto kornobatis, muĝblekis, fosjetis la sablon, svingofrapis per la vosto* zvíře trkalo, řičelo, rylo v písek, švihalo ohonem — *nemalhavebla* nepostrádatelný — *miresprimo* projev obdivu — *fajrospirita* ohnivé povahy — *penlacigita, senspira* schvácen, bez dechu — *plenskribita folio* popsaný list — *svarmdanci* vířiti — *mirabunda teatro* roztodivné divadlo — *el lia kapo elfumiĝis io* z jeho hlavy se něco vykouřilo — *li tirŝiris al si la harojn* rval si vlasy — *la haroj al li brosleviĝis* vlasy se mu zježily — *liaj cerbradetoj haltas* kolečka jeho mozku se zastavila — *ekfajfi blovlaŭte* tichounce zahvízdati — *li elpuŝis el si senkontinue la frazon* vyhrkl ze sebe přerývavě větu — *li versence ploregis* on přímo brečel — *ŝvitlarmoj gutfluis* kapky potu stékaly — *diktipe presita teksto* tučně tištěný text — *fadenkontinue reciti* odříkávati jako po šňůrce — *ploremociita* k pláči dojat — *detalvaste priskribi* obšírně popsati — *streĉatente observi* napjatě sledovati — *la finsceno* dohra — *la volsigno* pokyn — *erarmiksi la vortojn* popléсti slova — *strangmiraj aferoj* roztodivné věci — *sopirĝemi* vzdychati — *esti bonstata, nebonstata* býti svůj, „nesvůj" — *ŝvitbani* koupati se v potu — *senfortige aflikti* schváliti — *ne povi iun satrigardi* nemoci se na někoho dosti vynadívati — *forbalanciĝi je kelke da paŝoj* zapotáceti se několik kroků — *riproĉadmoni* domlouvati — *elvolbi la bruston* vypnouti prsa — *ĝisatendu . . .* dočkej — *beltalia virina staturo* lepá ženská postava — *piedfingre postsekvi iun* po špičkách krásti se za někým — *delikatŝtofa vestajo* jemný šat — *ĝojsona rido* výskavý smích — *li estis vortnepova* nebyl slova mocen — *flugdelikate li mallevis sin sur la herbotegitan benkon* snesl se jemně na drnové sedátko — *saltprenante po ok ŝtupoj* bera po osmi schodech — *sunluma vizaĝo* tvář jako slunce — *rondodanci pro ĝojo* tančiti radostí dokola — *diveneme rigardi iun* pátravě na někoho pohlédnouti — *nubmiene kapneigi* zavrtěti zamračeně hlavou — *bruforte marŝi* prudce choditi — *kormalĝoje* zkormouceně — *amaventuro* milostné dobrodružství — *vivspertoj* životní zkušenosti — *sangruĝaj rozoj* rudé růže — *finludi la rolon* dohráti úlohu — *dankŝulda* díky zavázán — *verdire* věru — *sinceranima* upřímný, otevřený — *laŭdire* prý — *flugaperi* mihnouti se — *mortinsido* zálud, nástraha na život — *dentklaki* jektati zuby — *veturi returnen, sed dorsantaŭen* jeti nazpět, ale pozpátku — *solenknabinoj* družičky — *fulmorapide* bleskurychle — *tutstranga objekto* prapodivný předmět — *ŝmirdesegni strangvariajn zigzagaĵojn* čmárati roztodivné klikyháky — *elgustumi la guston* vychutnati chuť — *ĝojatendi iun* těšiti se na někoho — *livreovestita*

tabloservisto premovaný jídlonoš — *vaporfumantaj, globrondetaj buloj* kouřící, kulaťoučké knedlíky — *transruli* převalovati — *fumnubo* mrak dýmu — *bonŝance* na štěstí — *supreneĥiĝi* dolehnouti nahoru — *tondrosonado* hromové dunění — *forblovi la fumvualon* odvanouti chuchvalce kouře — *almeti ŝtalkatenon* připnouti ocelová pouta — *danĝerminaca persono* nebezpečná osoba — *fervojo - relvojo* železnice - trať — *saltleviĝi* vzchopiti se — *alarmsignalo* poplašné znamení — *surŝutaĵo* násep — *ŝutkovri* posypati, nasypati — *verŝimile* pravděpodobně — *mirakla akrosento* zázračný bystrozrak — *sciavida* dychtivý — *sendifekte* bez úrazu — *plenbuŝe diri ion* říci něco na plno — *armerevuo* přehlídka vojska — *delongtempa revo* pradávný sen — *ĉionscia* vševědoucí — *falsludi, trompludi* hráti falešně — *vortinterŝanĝo* výměna slov — *kokfuriozaj rivaloj* rozkohoucení soupeři — *miregoplena vizaĝo* udivená tvář — *ruzlerte trompsuperi* „mazaně“ přelstíti — *remdirekti* zaveslovati k . . . — *bovrigardi* čuměti — *hokstango* hák (na tyči) — *svingjetiĝi* hoditi sebou — *batfroti ies vangon* „natříti“ někomu tvář — *finfino* konec konců — *kiomkvante, kiomfoje* kolik (o množství) — co a kolikrát — *penlaboro* dřina — *senrezone* bez námitek — *flugpendanta en la aero* vznášející se ve vzduchu — *tujsekve* ihned na to. (*Dañrigo.*)

PROPAGATORŮM.

Námitka 7. **Nelze utvořiti umělou řeč, neboť řeč jest něco živého a přirozeného.**

Předně, co jest živá řeč? Jazyk jest živým tehdy, když umožňuje, aby lidé, kteří jej užívají, mohli vyjádřiti všechny své duševní pojmy a pojmenovati všechny hmotné předměty těchto pojmů. Tedy jazyk, ať umělý či ne, kterého větší či menší počet lidí užívá s plným úspěchem k tomuto cíli, jest živou řečí a jest tedy také dokázáno, protože již od 20 let Esperanto plní tento úkol, že může existovati umělý jazyk, který jest živým. Což theorie by nedovolila toto předvídati? Kdyby jazyk byl něčím přirozeným, všichni lidé by musili mluviti stejným jazykem; že však právě naopak mluví různými jazyky, jest patrno, že člověk zajisté snažil se vytvořovati způsoby vyjadřování svých myšlenek a následkem toho výrazy ty jsou umělé. Všechny tak zvané přirozené řeči jsou tedy umělými a jest možno utvořiti o jednu více. Namítá se rovněž, že národní jazyky obsahují cosi, co nazývá se duchem či

geniem, který je charakterisuje a který, jako tvary a zvuky výrazů. odděluje jeden od druhého. Praví se, že tento duch se během století pomalu utváří a obsahuje duši národa, který jazyka užívá: umělý jazyk prý nemůže míti toho ducha a zůstane souhrnem výrazů bez vnitřní spojitosti.

Odpovězte, že živá řeč zajisté musí míti ducha, ale mezinárodní jazyk má nadřízeného ducha kterékoliv národní řeči, neboť duch ten jest i duší lidstva: tento duch, jestliže řeč umožňuje vyjadřovati všechny nejkrásnější a nejvyšší pojmy lidí, dá jí život rozsáhlejší a mohutnější, než jest život kteréhokoli přirozeného vyjádřování.

Z CELÉHO SVĚTA.

VIII. světový kongres esperantský v Krakově 1912 (11.-18. srpna). Ministerstvo železnic povolilo účastníkům kongresu 30% slevu na jízdném platnou i týden před a týden po sjezdu. Rakouští účastníci vyžádejtež si u výboru složní list pošt. spořitelny k zaslání příspěvku. — Zemský průmyslový svaz haličský seznámí hosty s vynikajícími původními výrobky domácího lidu zvláštní výstavou, na níž budou podávány všechny vysvětlivky v Esperantu. Ředitel svazu Krzaczynski sám učí se Esperantu, aby mohl přednášeti o lidovém umění. Rovněž ředitelé krakovského „divadla novinek“ Polenski a Pilarski studují Esperanto, připravujíce zvláštní esperantský program varietní a zábavní. K vybídnutí přípravného výboru uspořádá též Spolek pro pěstování krásných umění ve svém paláci výstavu polských malířů a sochařů. Katalog jakož i veškeré informace budou esperantské. Výstava naší literatury, kterou organisuje zvláštní výbor, bude obsahovati úplnou sbírku všech knih a publikací esperantských; zapůjčené předměty budou vráceny po 30. srpnu. Adresa výstavního odboru: S-o B. Herold, Lwów, Potockiego 22. Galicio. O vysoké umělecké úrovni hudebního světa polského přesvědčí se účastníci sjezdu na jubilejním večírku, který organisují professoři krakovské konservatoře: Drozdowski, Barabasz, Kalinowski a Walewski. — Krakovské časopisectvo velmi horlivě pečuje o seznamování čtenářstva s postupem přípravných prací sjezdových, přinášejíc pravidelné zprávy o kongresu dvakráte týdně. Všechny redakce budou zastoupeny na sjezdu svými zpravodaji, kteří Esperanto ovládají. — Veřejnost krakovská sleduje rovněž pilně hnutí esperantské, o čemž svědčí současně pořádaných 17 kursů: mezi nimi zvláštní zmínky zasluhuje kurs pro úředníky Obchodní komory, kurs pro policejní strážníky (kteří jako při sjezdech minulých budou průvodčími cizinců) a pro číšníky. Pamatováno na esper. obsluhu hostí i v restauraci vegetár-

ské. — V zájmu snazšího seznámení se účastníků sjezdu připravuje výbor album, v němž by byly podobizny všech otištěny. Zašle-li každý účastník svoji fotografii s objednávkou alba, lze tuto publikaci vydati. Kromě oznámených již bohoslužeb katolických s kázáním v Esperantu bude kázati v chrámu protestantském rovněž v Esperantu představený krakovské obce protestantské dp. K. Michejda. — Do 1. května přijímají se přihlášky spolků, které chtějí, aby jim ke zvláštním schůzím byly zamluveny potřebné místnosti. Adresa: Esperanto-kongreso. Kraków.

Literární soutěž jest vypsána letošního roku jménem **VIII. kongresu** redakcí časopisu „Pola Esperantisto". Na rozdíl od minulých, obsahuje tato soutěž méně themat a značnější odměny, což v zájmu četnějšího obeslání lze vítati.

I. Belletristický článek (alespoň 5000 slov) libovolného thematu. Odměny **156 K, 84 K** (viz níže).

II. Báseň (alespoň 24 verše) libovolného thematu. Odměny: **72 K, 48 K.**

III. Vědecká rozprava (vyloučena historie, literatura). Odměny **156 K, 84 K.**

Poznámky: Všechny práce — původní — psané strojem nebo cizí rukou (čitelně!) buďtež opatřeny heslem; stejné heslo budiž napsáno též na obálce, v níž jest jméno a adresa autorova. Všechny rukopisy buďtež zaslány redakci „Pola Esperantisto" (Warszawa, Wlodzimierska 8.) před 15. červnem t. r. Cenou poctěné práce jsou majetkem autorů. Ostatní budou vráceny na požádání; třeba však nahraditi poštovní výlohy.

Přípravný výbor sjezdový obrací se ke všem přátelům esperantské literatury, aby věnovali ke zvýšení zájmu o tuto soutěž peněžité dary. Redakce „Pola Esp." upsala již **60 K,** o které budou výše zmíněné odměny zvýšeny (I. a III. po 24 K, II. 12 K).

Sjezd krakovský jest výtečnou příležitostí, aby byla cizina informována o Polsku a aby vzbuzený zájem jevil se i v čilém ruchu turistickém. Proto byli získáni v řadách cizozemských Esperantistů vynikající řečníci, kteří přednáškami (se světelnými obrazy) vykonají zajisté pro Krakov více než-li spousty šablonovitých tiskopisů redigovaných v jazycích národních. Poslední dobou přednášejí o Krakově v Rusku, ve Francii, v Belgii, v Německu a v Dánsku E. Privat. C. Bourlet a Parrish.

O světové organisaci Esperantistů má býti letošního roku jednáno na kongrese krakovském. Ve mnohých časopisech esper. rozvinula se poslední dobou živá debata o tom, má-li býti ustavena tato nová organisace sídlem v Centra Oficejo v Paříži, která zajistila by finančně existenci této korporace a která měla by býti jako samostatné středisko představitelem celého světa esperantského před institucemi státními, říditi prostřednictvím řádně volených delegátů esperantských spolků jednání kongresní a plniti

jejich usnesení. Se strany svazu Universala Esperanto-Asocio jest vyslovována obava, že nezbytným vybíráním příspěvků pro tuto novou organisaci seslabí se samozřejmě zájem o tento svaz a jest jím podán návrh na ustavení organisace podobné, avšak jako odboru U. E. A. Otázky, o které bude se jednati na letošním sjezdu v Krakově, byly předloženy již některým esp. spolkům ve Francii, které byly požádány o sdělení názoru členstva. Považujeme za vhodné uveřejniti tyto dotazy a doufáme, že naše spolky sdělí nám v nejbližší době své mínění. — 1. Souhlasíte se zásadou, aby spolky platily pro světovou organisaci nízký příspěvek za všechny své členy? 2. Dáváte přednost příspěvkům jednotlivců, placeným jen libovolně ale zcela nezávisle na příspěvcích klubovních? 3. Považujete za záhodno, aby komise ustavená VII kongresem přijala alespoň v zásadě návrh na sloučení U. E. A. s Centra Oficejo? 4. Mají býti volby delegátů pro VIII. kongres vykonány od každého člena klubu (čímž by se ovšem rozluštění celé otázky oddálilo o jeden rok)? 5. Jak veliký byste navrhovali příspěvek? (Centra Of. navrhuje za jednotlivce 20 h, různé spolky hlasovaly pro 5 h ročně).

ESPERANTA MOVADO INTER BOHEMOJ.

Nia eminenta samideano s-o prof. Dr. V. Rosický estis pro sia laboro sur la kampo de pedagogio kaj scienco nomita lerneja konsilanto. La fakto certe ĝojigos ĉiujn bohemajn Esperantistojn, inter kies vicoj jam de longe s-o konsilanto Rosický valorigas sian influon por bono de nia movado. Sed dolora sciigo ligiĝas al tiu ĉi momento: la 6. de marto la eminentulon trafis korvunde la senkompata Fato, kiam lia amata vivkunulino, la tre estimata sinjorino Matylda Rosická mortis. En nomo de ĉiuj samideanoj esprimis sian kondolencon al la familio reprezentantoj de B. U. E. ĉe okazo de la enterigo.

La sokolaj festoj en Praha estos sendube la plej konvena rendevuo de Esperantistoj bohemaj, kiuj ĉe tiu ĉi okazo vizitos en granda nombro nian urbon. La komitato de B. U. E. konsideras tiun ĉi tempon speciale taŭga por la ĝenerala kunveno.

Al la kandidatoj por la supera kaj elementa ekzamenoj pri Esperanto sciigas la Ekzamena Komitato, ke la plej proksima termino estas fiksita je tagoj de la sokola festo. Detalajn informojn ricevos ĉiu kandidato rekte de la Komitato.

Esperanto-Oficejo en Praha II. Vodičkova ul. 38 rekomendas al la **bohemaj samideanoj**, kiuj veturos al la tutmonda kongreso en **Kraków**, ke ili sciigu tion al ĝi; informojn kaj utilajn konsilojn por la vojaĝo, kiujn sciigos la kongresa komitato al ni, ni komunikos al la aliĝontoj. Oni povos plej konvene uzi la someran rapidvagonaron (rabato 30%).

La VI. Sokola kongreso en Praha akceptis laŭ rekomendo de nia Centra Asocio B. U. E. Esperanton por la reklama servo.

Ilustrita flugfolio pri la celoj de tiu ĉi centmilmembra organizaĵo diskonigos la nunjaran kongreson en la tuta mondo pere de la gazeto „Esperanto“ el Genève, al kies n-o aperonta la 20. IV. estos almetitaj 3200 ekz. da tiu ĉi propagandilo. Bohemaj kaj fremdaj samideanoj, kiuj deziras ricevi ankoraŭ kelke da restantaj ekzempleroj, skribu al B. U. E. (almetu poŝtmarkon por afranko). Sendu la informilojn al viaj korespondantoj fremdlanden.

Gvidfolio tra Praha aperis samtempe kun la suprenomita propagandilo sokola. Ĝi estas presita sur kvar paĝoj (mondformato 11·5 × 16·5) kaj enhavas eltirajon el la granda esperanta gvidlibro tra Praha. Mil ekzemplerojn de tiu ĉi verketo sendis B. U. E. al „Universala Esperanto-Asocio“, kiu uzos ilin por doni informojn al la demandantoj, kiuj deziros viziti dum siaj vojaĝoj nian bohemian metropolon. Jam pli multe ol 70 urboj posedas similajn gvidfoliojn kaj sekve estas la apero de ĉiu nova eldono plej bonveninda, ĉar ĝi kompletigas la organizon de utilaj reciprokaj informoj tutmondaj. Kiu volas entrepreni vojaĝon tra kelke da urboj aŭ landoj, skribu al la oficejo de U. E. A. (Genève) kaj postulu kolekton da gvidfolioj tra tiuj urboj, kiujn li intencas viziti! Kiu deziras servi al siaj korespondantoj per la flugfolioj tra Praha, mendu ilin ĉe B. U. E. (10 ekz. por 25 hel.).

La nealta presprezo ebligas ankaŭ al negrandaj urboj, ke iliaj esp. kluboj eldonu similajn gvidfoliojn. Prezo por mil ekz. 4-pĝ. K 21·40 (plua milo K 7·20); mil ekz. 2-pĝ. K 12·80 (plua milo K 4·50); kompostita per malpli grandaj tipoj kaj sur malpli fortika papero.

La urbestraro de Praha subtenis en tiu ĉi jaro per subvencio de 50 K la laborojn de B. U. E. Ĝi estas jam la kvara subteno, kiun nia Centra Asocio ricevis de la urbestraro.

Por la listo de honoraj komitatanoj de la VIII. Universala **Kongreso en Kraków** estis proponita en nomo de niaj samideanoj bohemaj sinjoro konsilanto prof. Dr. V. Rosický.

La bonmemora gasto de nia ĉefurbo, **Sir T. Vezey Strong**, eksurbestro de London, sendis al nia Bohema Unio Esp. sian portreton kun esperante skribita dediĉo. La bildo, elmontrita kune kun lia letero en fenestro de firmo Staněk (Ferdinandova třída) vekis ĉe la multnombraj preterpasantoj intereson por Esperanto.

Esperanto en la **bohemaj gazetoj:** Rubrikoj regulaj aperadas en „Národní Obzor“ (B. U. E.), „Rodina“ (s-o Bartoš), „Osvěta Lidu“ (s-o Dr. Schulhof), „Č. Železniční Listy“ (s-o Jos. Šilhart), „Přehled Revuí“ (B. U. E.), „Č. Č. assistentů drogerie“, „Hlasy z Hané“ kaj „Pokrok“ (s-o prof. A. Pitlík).

En „Vídeňský Denník“ aperis kelke da artikoloj de s-o K. Macháček; „Budivoj“, „Chodský Prapor“, „Jihočeské Listy“ kaj „Obnova“ enhavis bonajn informojn. — La interesa monata revuo „**Přehled Revuí**“ (Praha II. 1781. Jare 12 K) enhavas de post la nova

jaro refoje rubrikon pri Esperanto. kiu siatempe estis interrompita. Aperadis tie ankaŭ notoj pri Ido kaj pri aliaj projektoj, sed la redakcio, konvinkiĝinte pri la sensignifeco de Ido, kiun ĝi rifuzas propagandi, plene proklamis sian favoron al Esperanto. Ni ĝoje raportas pri tiu ĉi fakto, ĉar tia decido, esprimita de redakcio spertiĝinta en ambaŭ rilatoj, povos esti influa kaj direktodona ankaŭ por aliaj, malpli spertaj. Ni rekomendas aboni la revuon, kiu estas vera kvintesenco de ĉio interesa, kion la perioda preso alportas.

E. K. en **Praha**: La ĝenerala kunveno okazis la 1. III. kaj estis elektitaj: s-oj lern. konsilanto Dr. V. Rosický prezidanto, K. Procházka vicprezid., Ing. Fr. Kühnl sekr., F. Novák kasisto. La biblioteko, zorge reordigita de s-o Jos. Bohuslav, troviĝas nun en la kancelario de B. U. E. (Vodičkova ul. 38), kie estas nun ankaŭ sidejo de la Klubo, ĉar la domo „u Donátů" estos rekonstruota: la vendredaj kunvenoj donas bonan okazon al ĉiu perfektiĝi en Esperanto: de la 8—9 okazas supera konversacia kurso gvidata de s-o K. Procházka kaj poste la kunvena traktado mem. — E. K. en **Žižkov**: La ĝ. k. (28. II.) elektis kiel prezidanton s-on J. Kopecký; kiel vicprez. s-on Fr. Winter, kiel sekr. s-on Jos. Rotter, kiel kas. f-inon Jos. Šípková. La kunvenoj okazas ĉiun merkredon vespere en hotelo Tichý. — E. K. en **Praha VIII.**: La ĝ. k. (27. III.) reelektis s-on V. Procházka prezidanto, s-on J. Šídlo sekretario. Kunvenejo: rest. Merkur. — E. K. en **Smichov**: La ĝenerala k. okazis la 12. III. Prezid. s-o J. Podlipský.

E. K. en **Č. Budějovice**: Prezidanto s-o faka instr. Svačina aranĝis la 3. III. en Č. Krumlov lumbildan paroladon pri Konstantinoplo (boheme) kun informa parolado pri Esperanto kaj ĝia signifo por nia nacio; la sukceso estis tre kontentiga kaj multaj esprimis deziron pri detalaj informoj. Similan paroladon sub titolo „Ĉe la limo de Norda Italujo" oni aranĝis en Veleším, kie nun okazas kurso pri Esp. de s-o J. Plánský (13 lernantoj). En Borovany instruas 55 kursanojn s-o Tomáš Plánský. En Č. Budějovice estis malfermitaj por 65 lernantoj du elementaj kursoj (s-o ĉefleŭt. K. Hollegcha kaj s-o K. Svačina kaj kurso supera. — Pluaj paroladoj pri Islando estis prezentitaj en Č. Budějovice (s-o V. Perek), en Č. Kremže kaj Borovany (s-o K. Svačina). Tiu ĉi taŭga okazo por propagandi Esperanton estas vere imitinda. — E. K. en **Bytouchov-Semily**: La ĝ. k. (25. III.) elektis: s-ojn St. Nožička prezid., Jos. Frýba vicprez., Rud. Tulak sekr., Jos. Jiříček kas. Kurso de s-o Jos. Malý finiĝis kun bona sukceso; la estraro kaj la lernantoj, kiuj diligente sekvis la lecionojn, dankas kore al sia senlaca instruanto. — E. K. en **Zlatá Koruna**: La ĝ. k. (20. III.) reelektis s-on parohestron A. Brandejs kiel prezidanton kaj s-on Karel Šustr kiel sekretarion. La kunvenoj okazas ĉiun merkredon. — En **Německý Brod** finiĝis la kvarmonata kurso de s-o instr. Ant. Souba.

La soc.-demokratia societo de fervojistoj „Pokrok" en **Plzeň** interesiĝas, danke la klopodojn de s-o ĉefkonduktoro Kubásek, pri Esperanto; speciala kurso de s-o B. Tyttl, malfermita post informa parolado, estas vizitata de 68 personoj. — **Prostějov**: La brazilia ministerio de agrikulturo sendis dankesprimon al la Esperantistoj de Prostějov, kiuj, laŭ admono de s-o Hugo Raulich, direktoro de la Komerca akademio, elpetis informojn pri la vera stato de la tiea koloniiga demando. Kiel konate, la aŭstria

ministerio avertis antaŭ elmigro en la koloniojn braziliajn, atentigante pri malario, sed la korespondantoj esperantistaj atestas, ke tiu ĉi pretendo estas senbaza kaj ili trovas la kaŭzon en politikaj rilatoj. La Esperantistoj de Prostějov publikigis sekve en la bohemaj gazetoj laŭverajn sciigojn pri la afero. — En la laborista domo gvidas kurson pri E. s-o Tyl; en la komerca akademio instruas tiun ĉi jaron refoje pri Esperanto s-o prof. A. Pitlík, kiu per la jus ricevita stipendio entreprenos unujaran studvojaĝon en Rion de Janeiro. — S-o Parrish el Ameriko, kiu paroladis dum sia propaganda vojaĝo tra Eŭropo dufoje en Prostějov, fianĉiĝis en Danujo kun esperantista samideanino.

Z ČESKÝCH ČASOPISŮ: Nejméně skutečnosti odpovídajících zpráv o hnutí esperantském dovídají se čtenáři esperantské rubriky posledních čísel „Osvěty Lidu", kde pisatel pan Dr. Schulhof propaguje neodůvodněnou potřebu officielního ustavení východočeského svazu Esp., tak že na to skutečně esperantské vlastně ani místa se mu nedostává. Nutno předeslati, že ve východních Čechách existuje sedm klubů esp., z nichž šest jest sdruženo v Ústř. Svazu B. U. E. jeden pak (Chrudim), prohlásil se samostatným, neuznávaje výhod ústřední organisace. Z Pardubic, kde pracuje na propagandě Esperanta p. Dr. Schulhof, a kde (stejně jako v Chrudimi) Unií založený spolek vlivem několika nových členů z Unie vystoupil a na to v nedlouhé době přestal existovati (jak nám před nedávnem psal p. Dr. Schulhof), kritisuje se dnes před veřejností všecka dosavadní činnost ústředí se zřejmým úmyslem několikaletou práci znehodnotiti; dokonce dovoluje si pan pisatel tvrditi, že „stávající organisace byla stavěna od střechy, kdy nebylo dosud potřebných základů a kdy nebylo ničeho k vázání a k sjednocování, jaký pak div, že úspěchy se nedostavily? Neví nebo nechce-li p. Dr. Schulhof věděti, že 16 spolků svého času jednomyslně se rozhodlo Unii založiti, pak jest jeho povinností buď se dříve o pravdě informovati nebo při nejmenším vyvarovati se tomu, aby svou tendenční zprávou veřejnost neklamal. Poukazujeme při této příležitosti na článek „Pli multe da respondeca sento" v č. 1 — Nedivili bychom se, kdyby v tomto městě utvořil se klub, který by svou činností propagační stal se jakýmsi střediskem a sám, založiv v okolí řadu nových spolků, navrhl by pak organisaci ústřední. Tak tomu bylo svého času v Praze (Klub a jeho odbory): takovým způsobem se založila Unie a to jest stavění od základu! Avšak snaha, soustředíti v novou organisaci kluby již Unií organisované, a při tom zatvrzele ignorovati Unii samu, pod záminkou nesouhlasu s cestou jí sledovanou pokud týče se přerušení veškerých styků s osobami pro závažné důvody spolkové a společenské vyloučenými,*) nemůže u rozvázných a upřímných lidí najíti souhlasu a jest schopna způsobiti v našem esperantském světě místo sjednocení, o které prý hlavně se jedná, pouze rozkol.

S potěšením můžeme vítati snahu našich spolků hlavně venkovských, aby pořádáním společných schůzek, výletů a zábav

*) Aby veřejnost poznala, s jakými povahami musely býti styky přerušeny, rozhodli jsme se uveřejňovati výňatky ze zápisů o schůzích spolkových, které všem nepředpojatým vysvětlí, že každá společnost musí v zájmu cti jednati tak, jak se stalo právě v tomto případě.

povzbuzovali zájem veřejnosti o Esperanto — k tomu není však přece třeba zakládati officielně nové svazy. Tím smutnější však jest, když z řad osob mimo náš spolkový život stojících appeluje se na spolky v Unii sdružené, při čemž tiskem šíří se do veřejnosti nepravdivé zprávy o vlastním ústředí a tak v řady upřímných přátel Esperanta vnáší se nechuť ku práci v zájmu celku a veřejnosti podává se úmyslně nesprávný obraz o hnutí esperantském u nás jen proto, aby vlastnímu projektu dodalo se jakési váhy. Ovšem — jak na poradní schůzce v Pardubicích dne 25. března před zástupcem Unie řečeno, — jedná se několika osobám, mimo Unii stojícím, o uplatnění osobního vlivu ve sdružených spolcích, z nichž pak má býti působen tlak na Unii, aby tato opustila vytčenou cestu, již důsledně sleduje. Ovoce takovéto činnosti ovšem nelze považovati za vážnou práci, neboť postrádá vší upřímnosti, jíž ve spolkovém životě jest tak nutně zapotřebí!

KORESPONDANTOJ: *33. S-o Henry Neybergh, *Bruxelles*, 151. Ave de Jette Belgujo (il. k.); poŝtmarkoj diferencaj bildflanke). — *34. F-ino Gertrudis Cantarell, Tarrasa, San Cristobal 19. *Barcelona*, Hispanujo. — *35. S-o Fr. Dupont, stud. de fil. Itegem ap. Heyst-op-den-berg. Prov. *Antwerpen*, Belgujo (il. k.) — *36. S-o Aleksandro Alekseev, *Tomsk*, Simonovskaja 28, kv. 1. Ruslando (il. k.; la poŝtm. bildflanke). — *37. S-o V. Esipov, *N. Tagil*, Perm. gub. 350. Ural. Ruslando (il. k.; p. m. ĉiam resp.). — *38. S-o A. Gaillard, banka oficisto, *Chateaurenard*, Provence, Francujo (dez. kor.). — *39. S-o J. R. Srebnev, *Tomsk*, Preobrajenskaja 25. Ruslando (il. k.). — *40. S-o Fr. Antonell, *Tarrasa*, S. Juan 51. Hispanujo. — *41. S-o C. Polak (por T. J. A.) *Kiev*, Kontora „Mazut" Ruslando (donos informojn pri esperanta asocio de lernantoj). — *42. S-o Mir. Tůma, karbolaloristo, *Hamborn*-Neumühl, Alexstr. 56. Germanujo (il. k.: ĉiam resp.). — *43. S-o Jos. Roig, *Barcelono*, Str. Montseny 67. 2a. Hispanujo. — *44. S-o Benito Belver *Barcelono*, Str. Milton 5. 1a. Hispanujo. — *45. S-o Boyd Anderson, 1597, Great Western Rd. *Glasgow*. Skotlando (il. k.). — *46 S-o Ed. Van Hoeck, *Haeltert* près d'Alost, 3. rue de l'Eglise, Belgujo. — *47. S-o Tmescányi István, *Budapest VII*. Rózsa u. 9. 1. 12b Hungarujo. — *48. S-o Marius Joly, *Orange*, V. Vieux-fossés, Vancluse, Francujo. — *49. S-o Georg W. Roome, *Scheffield*, Psalter-Lane 214, Anglujo. — *50. S-o Ari Vrolÿk, *Scheveningen* 130. Maaswykstr. Holandujo. — *51. S-o E. Jóly, *Paris*, rue Championnet 66. Francujo. — *52. F-ino G. W. Honghton, *Keighley*, 180. North St. Anglujo. — *53. S-o K. Pichot, Monaco, r. du Princes 3. — *54. S-o G. Strössner, *München*, Brieffach 28. Bavarujo. — *55. S-o Bacchi Giovanni, *Genova*, via Rivale 28A 18. Italujo.

BIBLIOGRAFIO en la sekvonta numero.

Eldonanto: Ed. Kühnl. — Presejo de Národní tiskárna a nakladatelství, společnost s r. o. v Praze.